

Félix LAGALAURE


---

**LA  
INDIVIDUALISMA  
SOCIALISMO**

de

D-ro AXEL ROBERTSON PROCHOWSKI  
el Nico (Francio)

Cercle espérantiste de l'Agenais  
F 47340 Laroque Timbaut  
1982 \* 2 FF



**D-ro AXEL ROBERTSON PROSCHOWSKY, el Nice (Francio)**  
Eksmembro de la Direkta Komitato de la Socialista Partio Dana  
Premito de la Usona « American Genetic Association. »



## Axel Robertson Proschowsky

---

Studento en Danio, poste kuracisto specialiginta je seksaj malsanoj, li la unua uzis permananganaton de potaso kiel desinfektilon en 1881.

Li provis publikigi en la oficiala gazetaro medicina la rezultatojn de siaj esploroj, sed ili estis rifuzitaj; tiam, lukte kontraŭ la bojkotado de l' danaj kuracistoj li eldonis broŝure en 1882 siajn unuajn laborojn, kiuj jetis al li la malamon de liaj samprofesianoj, de l' pastraro sekshontema, de la magistratoj kaj de la registaro, ĉar li ne kaŝis siajn ideojn « antaŭeniremajn » tie konsideratajn kiel ribeligaj en reĝimo tute aŭtokrata. — Tiam li proponis *forigi* la reguligon de la *prostitucio* kaj la aĉan *policon de moroj*, kaj krei *sindikatojn de publikulinoj*, pagantaj sian kuraciston; ĉiu

sindikatanino devus *resti en hospitalo* de seksmalsanuloj por *lerni koni* la malsanojn, ŝirmi sin de l' infektadoj de siaj klientoj, kaj uzi *ili mem* severan profilaktikon.

La memestimo de la doktoroj vundiĝis kaj la luktado plifortiĝis kontraŭ la polico de moroj. *Oni estis persekutonta* liajn broŝurojn, kiam pro morto de l' direktoro de tiu polico, haltiĝis la proceso, kaj D-ro Proschowsky ĝojis vidi la opinion iĝi favora al liaj tezoj; *la subdirektoro* de l' polico de moroj *estis devigita sinmortigi* pro diskonigo de liaj malbonaj faroj, kaj post nelonge, la registaro decidis forigi en Danio la *reguligadon de la prostitucio* kaj la *polico de moroj*. Tio estis nekontraŭdireble la plej bela venko de l' Doktoro.

Sed tiu venko daŭris mallonge, la eklezio persekutis la liberpensulon, liaj samprofesianoj kaj la registaro persekutis la socialiston, kiu helpis la laboristojn, la malfortulojn en iliaj luktoj kontraŭ la aŭtoritato; vane oni insidis kontraŭ li milfoje, sed studante la onanisman, la seksan malfortecon kaj la anomalion de l' seksa deziro, per presitaj demandiloj, kiujn li sendis al klientaro, li estis *repersekutata*, ĉi-tiu foje *pro atenco al la moroj*, malgraŭ la karaktero pure scienca de liaj studoj; D-ro Proschowsky, provis tute speciale per siaj demandiloj *klarigi* la rilatojn inter la sonĝoj kaj

la seksa deziro, kaj tiel li estis la pioniro de Freud. Sed lacigite de tiu malegalforta luktado en lando kie la justeco estis inkvizicia, forlasite eĉ de siaj laboristaj kamaradoj de l' socialista partio, kiuj timis tian aŭdacon, Proschowky, anoncis sian pravigitan forveturon por iri daŭrigi libere siajn studojn aliloken....


Cetere li memorigis ke Hirschfeld en Germanio kaj Havelock Ellis en Anglio suferis saman sorton, la unua pro tio ke liaj studoj koncernis la Homoseksecon, kaj la dua la fazojn de Seksa Vivado. — Post diversaj vojaĝoj en Ameriko kaj nombraj regionoj tropikaj, li restas en Nice, kie sen pejzaĝisto li kreis sian ĝardenon de aklimatizado « Les Tropiques », iam *unika en Eŭropo*, pro la varieco de la specoj tie kunigitaj. Li vivas tie aparte de la elegantularo, sed en konstanta rilatado kun la sciencistaro : li havas grandan korespondadon pri botaniko, medicino, sociologio, k.t.p. Liaj ideoj pri *homa selektado* estas originalaj, li restas la bela idealisto de sia juneco, kaj li eĉ konservis sian belan basvoĉon, kiu resonis en unuvoĉaj kantoj ĉe nordaj koncertoj, kaj pri kiu lia filino, kantistino en Parizo, faris lastatempe la plej belan laŭdon laŭ arta vidpunkto.

Meze de siaj filoj, li daŭrigas sian apostoladon por la homa emancipado. por la scienco al kiu

li ĉion fordonis, sian trankvilecon, sian riĉaĵon,  
sian vivon....

Ke la afekcio de la liaj igu lin forgesanta la  
malbonajn tagojn, la pasintajn luktojn, la stultaĵojn  
de la grandaj homoj, kaj konservu lin al ni  
ankoraŭ longe kiel belan ekzemplon de *fido al  
pli bona estonto*, kiun li vokas kun ĉiuj siaj  
deziroj.





# La Individualisma Socialismo

En la gazeto « Cri de Nice » (Krio el Nice) 1921 ĝis 1922, la sciencula doktoro publikigis tre interesajn artikolojn kies enhavon mi resumos por la geesperantistaro. Kvankam li scias multajn eŭropajn lingvojn, nia amiko estas, kiel ĉiuj nobluloj, idealistoj, kiuj aspiras doni al malfeliĉaj klasoj de nia Socio pli da feliĉo, pli da edukado, pli da individua libereco, favora al la disvastigo de la internacia lingvo.



## La Individualisma Socialismo

Forigo de paraziteco estas la ĉefafero de Socialismo, ĉar ĉi-tiu forigo detruas la ekspluatadon de homo al homo. Ĉar ni ne konas la celon de nia ekzistado, la vivorajto estas por ĉiuj egala, kaj ĉio, kio helpas la daŭrigon de tiu-ĉi vivo, devas esti *komuna propraĵo*. La ekzisto de l' nuntempaj sociaj klasoj estas kontraŭa al la rajto kaj logiko, la kapitalismo trafas sencencaĵon kaj la *parlamentara demokratio estas farso* en kapitalisma socio. Okazos do fatale, ke la mizeruloj intencos fari revolucion kaj ŝanĝi la nunan situacion. Ĉu la sekvanta tago la socio estos pli bona?, ĉu ĝi povos esti pli bona? Jen tio, kion demandas la Doktoro, kaj li konkludas ke la socia transformiĝo konsistas el la ŝanĝiĝo de la spirito-stato, sed ke tiu ŝanĝiĝo neniam estos ebla dum la nutraĵo ne estos al ĉiuj garantiita de la socia anaro.

La granda eraro de la socio kapitalisma, estas



labori por *havigi profiton* al la kapitalistoj anstataŭ labori por *kontentigi la bezonojn* de la Homaro, kaj D-ro Proschowsky trovas la socian ekonomion kapitalisman falsa scienco. komparante ĝin je la scienco medicina, kiu dum jarmiloj kuracadis per rimedoj iluziaj, neutilaj kaj fantaziaj, dum la kaŭzo de l' malsanoj estis tute nekonata. Tial li akceptas kiel *bazon* de kiu ajn konstruova sociologio, la Socialismon, t. e. homan socion, kie ĉiuj produktorimedoj estas komuna propraĵo kaj uzataj ne por la profito de kelkaj sed por la kontentigo de ĉies bezonoj.

Ĉu Ŝtata Socialismo forte centralizita, aŭ socialismo laŭ libera kunlaborado, el kiu estus forigita ĉia trudado kaj kiu uzus la individuan iniciativon? Jen la du grandaj dividoj de Socialismo el kiuj oni bezonas elekti...

Per belaj paĝoj D-ro Proschowsky montras ĉiujn malbelajojn, la tutan banalecon kaj fivulgarcon de la kapitalisma socio, kaj li kontraŭmetas veran sciencan sociologion konstruovan. Li montras tion, kion Rusio jam faris kiel eksperimenton pri socialigo de la produktilaro kaj ankaŭ ĝian penadon por klerigado.

Bedaŭrante ke tie la kritikado estas malhelpata ĉar ĝi estas la bazo de ĉiu homa progreso, li fidus al Rusio kaj li esperas, ke tie oni sin

direktos administrade kaj politike al socialisma malcentralizado.

Pri la socia higieno, kiun li konas speciale, la Doktoro klarege komprenigas la diferencon inter la medicino en socialisma reĝimo, ĉe kiu la doktoroj laborus por ĉies resanigo, kaj la nuntempa medicino kiun ili uzas por propra profito, t. e., ili bezonas ke estu kiom eble plej multe da malsanuloj !!!

Krome, la socialisma reĝimo certe pliklerigos forte la popolmasojn, ĉar ĝi uzos la kompetentularon por la profito de la anaro, kaj en nombraj paragrafoj la Doktoro reliefigas la gravecon de la *moralaj faktoro* ĉe homa socio : « *La Klereco devas esti la Motoro kiu laborigas kaj agigas.* »

Poste, la produkta laboro estas studata kaj aranĝata laŭ la bezonoj de ĉiu komunumo kaj ne laŭ la laborprofito, kio forigos certe multe da neutilaj industrioj. La distribuado de la produktaĵo estos la ĉefafero de l' socialisma gvidantaro : ĉiuj produktivaj fortoj estos tiel kunordigitaj por ke la *penado de ĉiu estu profitdona al ĉiuj* kaj ne plu estu naŭza. Li akceptas kiel socian faktoron la *admiradon* nome, ke la homo estas influata per tio, kion opinias la proksimularo, kaj li intencas uzi tiun influatecon por la labordividado en socialisma socio.

La problemoj, *homa selektado* por la plibonigo

de la intelekto, estas nediskutebla, kaj tiu-ĉi grava ĉapitro estos studata pli poste. Dum interargumentado kun Kapitano G., D-ro Proschowsky difinasian pozicion en la socialaj teorioj kaj asertas, ke li ĉiam celis kombini el komunismo *tion, kio estas necesa*, kun *tio, kio estas ebla* el anarkismo kaj ke li elektis la terminon Individualisma Socialismo por pli bone difini sian opinion: li diferencas je la anarkistoj ĉar li volas organizi kunlaboradon, laŭ disciplino konsentita *de ĉiuj por profito de ĉiuj* kaj li demandas: Kiu plenumigos la kontraktojn libere konsentitajn inter produktantoj kaj konsumantoj ĉe anarkisma socio?... Sed sekve, diskutante pri la reguligo de la vivo, la Doktoro akceptas ke efektive la *feliĉeco estas la sendependeco individua*, kaj li pretendas ke la grupigo ĉe socialismo por produktado estas la *garantio de tiu-ĉi sendependeco*, do, de la feliĉeco mem !!!

Tuj kiam la komuna laborado estas finita, li postulas tutan liberecon por la privata vivo de l' civitano, liberecon por la grupoj, interrespekton por la kredoj kaj ideoj, toleradon por la gustoj por la arto, kaj opinioj, k. t. p. Tiu-ĉi libereco naskas tion, kion li nomas "Nobla Konkurado", la sola profitdona al homa progreso.

Longa artikolo pri la rekta demokratio de

Rittinghausen, konigas al ni la funkciadon de la socialisma socio, de komunumo ĝis ŝtato, popol-registaro, konsistanta el vera popolo, sen personaj profitoj, sed nur la Individualisma Socialismo permesos malvolviĝi libere la individuon, ĉar la necesaj kondiĉoj por tiu malvolviĝo estos efektiviĝitaj, kaj D-ro Proschowsky rediras, ke en la rekta demokratio, la intelektularo ludos *ĉefan rolon*, kaj la reprezentantaro de l' popolo ne plu konsistos kiel en la nunaj demokratioj el ambiciulaĉoj, sed reprezentos la plej intelektaj kaj moralaj homoj.

Kiel bazon de racionala socio li difinas du neprajn kondiĉojn sen kiuj nenia justeco estas realigebla :

1-a : Redono de la produktilaro al la anaro.

2-a : Deviga laborado de ĉiuj.

Li konsideras la *manlaboradon* metodo de moralaj edukado, kaj li asertas, ke same la teknikisto kiel la sciencisto certe profitos el ĝi. (Tio ne mirigas kiam oni scias pri la manlaborego kiun la Doktoro faris en sia bela aklimatiza ĝardeno « Les Tropiques » kie aleoj, basenoj kanaletoj, ŝtuparoj el cemento, balustradoj k.t.p. estas grandparte faritaj de li).

Tiam, *ĉi tiu ĝarantio de l vivo materiala* de ĉiuj, estas la kondiĉo mem de ĉia vera progreso

de l' homaro, kaj kiam ĉi-tiu garantio ne ekzistas estas absurde *paroli pri libereco*.

Poste li klarigas la disvolviĝon de la artoj sciencoj, fabrikado de objektoj mekanikaj k. t. p. kaj li akceptas por la metiisto, la artisto, la laboristo la privatan posedadon de l' objektoj *faritaj de ili mem*, ekster la kolektiva laboro, tio estas, dum la libertempoj kiujn havigos la reĝimo.

Fine, D-ro Proschowsky venas al granda demando, kiu iam regos la socian problemon, nome la *homa selektado*, nuntempe tiom malatentata de la kapitalisma socio. La nuntempaj socioj estas fonditaj sur miljaraj karakteroj heredaj kiel tiuj de la plantoj aŭ bestoj; same kiel la selektado havigas distingindajn rezultatojn por krei novajn rasojn de plantoj aŭ bestoj, la homa selektado iam naskos homaron de supera raso, sed ĉi-tiu selektado estos farata kiel ĝi estis farata prae, antaŭ kiam la riĉaĵo ne estis la celo, sed nur la forto, la kuraĝo, la inteligento, la boneco estis la faktoroj preferataj, kaj kiuj superregis la selekton.

D-ro Proschowsky diris ankaŭ en la « Réveil de l'Esclave » (Vekiĝo de l' Sklavo) de januaro 1925: « Oni ofte miris ke de la plej malnova historio, oni ne povas konstati esencan diferencon inter la kapabloj mensaj de la tiama homo kaj

la moderna ; mi prezentas do jenan klarigon, kiu ŝajnas al mi tiom logika kiom simpla, ke okazis *halto de homa selektado* eŭgenia (tio estas, rekte al evoluanta progreso) en tiu tre malproksima momento, kiam la riĉeco fariĝis la idealo celata kaj influis profunde la geedziĝojn ; sekve oni komprenas, ke per la libera geedziĝo, ne plu ricevanta la malaltigan influon de monaj konsideroj, la homaro ekvivos epokon kun kiu neniu alia de l' historio estos komparebla laŭ graveco, kaj nur tiam, kiam la vivrimedoj estos certigitaj al ĉiuj, *rekomenciĝos la homa evoluado* tute komplete, superigonta nekalkuleble nian specon laŭ valoroj korpa, estetika, intelekta kaj morala, tiu-ĉi lasta la plej grava por feliĉa vivado en Socio. »

« Samtempe estos kreataj fine la kondiĉoj, kiuj ebligos la kontentigon de la bezonoj tiom nekontraŭstareblaj de la *vivo afekcia, kiu ludas la plej grandan rolon por la feliĉo*, bezonoj kiuj estas preskaŭ ĉiam kontraŭataj kaj subpremataj en nia nuntempa socio, kio tiom malbriligas, seninteresigas kaj senĉarmigas tiom da homaj ekzistadoj sen ies profito ! »

— Ĉio tio estas farebla nur post la detruado de la Kapitalismo, kiu per sia malalta idealo kaj

monserĉado kiel celo de sia vivo, malhelpis la socion sekvi la Progreson en ĉiu senco.

-- Kun malavara optimismo, kun espero al pli bona estonto, finiĝas ĉi-tiu serio de artikoloj mal-feliĉe tro longaj por esti presataj komplete; mi esperas almenaŭ, ke ĉi-tiu resumo, kvankam tro mallonga, komprenigis la esencan parton.

*(Tradukita de LIBER.)*



NOTO. -- Estas petate sendi specimenon de ĉiu represajo esperanta aŭ nacilingva al la Klubo.

Gérant & Imprimeur : Baudé 47340 Laroque

Fote represita laù originalo eldonita  
de  
"RASA VIRINA KLUBO"